

La Espero

2006:3

130 esperantistoj en jubilea kongreso en Malmö



La jubileo estis 100-jara jubileo de Sveda Esperanto Federacio kaj Klubo Esperantista Malmö. El tiuj ĉirkaŭ 30 danoj kunsidis kaj festis kun ni.

Venis ankaŭ gastoj el aliaj landoj - Germanio, Pollando, Litovio.

Speciale ĝoje estis la multaj gejunuloj kiuj distris nin. Kim J Henriksen de Kopenhago gvidis danckurseton kaj dancis nin ĝis ŝvito gutis. Ankaŭ la ĉarma grupo "La perdita generacio" kantis kaj ludis kaj la publiko tre alte taksis ilian programon. La grupo fondiĝis 1995 el la verdista movado en Skellefteå kaj la grupo iom post iom esperantiĝis. Dum IJK en Rusio 2004 LPG ricevis la premion "Plej interesa muzikgrupo".

Sesdekoj da kongresanoj partoprenis boatvojaĝon sur la kanalo kun "Rundan" ĉirkaŭ Malmö. Alia grupo promenadis en la "malnova urbo" en Malmö.

Dum la "Interkona vespero" la prezidanto rakontis pri Historio de Klubo Esperantista de Malmö, kaj la filmon pri la Universala Kongreso en Malmö 1948 oni montris.

Zita Garbareciviené gvidis etan esperantokurson por komencantoj.

Kelkaj partoprenantoj vizitis nian klubejon kaj tie la du mastrinoj regalis per kafo kaj kukoj.

Inaŭguro de la kongreso

Sten Svenonius, prezidanto de KEM kaj de la jubilea komitato, bonvensalutis la ĉeestantojn kaj li speciale turnis sin al Lena Jarnbring-Lindholm, vicurbestro de Malmö. Ŝi prezentis la urbon Malmö, kiu evoluis de mal-



Supre: Kim Henriksen dansigis la partoprenantojn de la kongreso.

Malsupre: La pramo "Rundan" tute plenplena sur la kanalo de Malmö.

Ĉiuj fotoj de la kongreso: Karin Lindquist.

Daŭrigo en paĝo 3.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Junio 2006 • 94-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2006: 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2006:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
rantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Telefon: P.g.a. flytt ingen just nu. Vi återkommer.

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona/

Telefontid: Vi återkommer med uppgift om detta.
Skrifliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Anita Dagnarsdotter

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@glocalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Kalle Kniiivilä

Kie vi naskiĝis?
Mi naskiĝis en Joensuu, en orienta
Finnlando, en 1965.

Kie vi loĝas?
Mi loĝas en Lund, kien mi translokiĝis
la unuan fojon en 1987.

Poste ni loĝis dum iom da tempo
en Moskvo dum la sovetia tempo,
poste en Vaasa en okcidenta Finnlan-
do. En ambaŭ lokoj mi laboris kiel
jurnalisto por finna gazeto, sed ni
ĉiam revenadis al Lund.

Pri kio vi laboras?
Mi nun estas ĵurnalisto ĉe la ĉefa ĵur-
nalo de Malmö, Sydsvenskan.

Mi ĉefe raportas pri lokaj novaĵoj,
sed de tempo al tempo ankaŭ verkas
pri okazaĵoj en ekssovetiaj landoj,
precipe Rusio kaj Belorusio, pri kiuj
mi iom kompetentas.

*Kiujn interesojn vi havas krom Espe-
ranto?*

Mi saŭnas ofte, eble ĉar mi estas fin-
no, almenaŭ dufoje semajne.

Mi multe legas, ofte en la rusa, be-
letron kaj lastatempe kelkajn intere-
sajn biografiojn. Mi ankaŭ ŝatas spekti
rusajn televidseriojn.

Ĉu vi havas familion?

Mia edzino Maria Sandelin naskiĝis
en Lund, kaj ni renkontiĝis same en
Lund antaŭ jam iom multaj jaroj. Ni
de ĉiam parolas Esperanton inter ni. Al
niaj gefiloj Ville (11-jara) kaj Alva (8-
jara) mi parolas finne kaj Maria sve-
de. Foje ili komprenas ankaŭ Espe-
ranton, precipe se ni havas sekretojn.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Miaj unuaj memoroj kun klara ligo al
Esperanto rilatas al la mezo de
la 1970-aj jaroj. Tiam mia ŝatata libro
estis malnova porjunulara enciklo-
pedio, kiu enhavis ĉapitron pri Espe-
ranto, verkita de Vilho Setälä. Serio-
ze mi eklernis Esperanton en 1982.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la
Esperanto-movado?*

Jes, de tempo al tempo. Dum la jaroj
1993-1997 mi redaktis la oficialan
gazeton de TEJO, TEJO Tutmonde. En
1995 mi ankaŭ membris en la Loka
Kongresa Komitato de la 80-a Univer-



sala Kongreso de Esperanto en Tam-
pereo kaj tie respondecis pri informa-
do. En la jaroj 1997-1998 mi estis ko-
misiito pri informado ĉe UEA, kaj en
1998-2000 estrarano de UEA pri in-
formado.

*Kiu estas via preferata libro en Espe-
ranto?*

Ŝajnas ke la plej bonaj originalaj ro-
manoj kiujn mi legis estis "La Gran-
da kaldrono" de John Francis, "Sed
nur fragmento" de Trevor Steele, kaj
"Ombro sur interna pejzaĝo" de Spo-
menka Štimec. Tamen, se mi devus
elekti nur unu preferatan verkon, ĝi
estus la trivoluma verkaro de Zamen-
hof, redaktita de Ludovikito. Ĝin mi
tralegis kun grandega intereso, kaj al
ĝi mi revenas de tempo al tempo, ĝar
ĝi diras multegon pri la unua tempo
de la Esperanto-movado kaj pri la
ĝenerala etoso en Eŭropo en tiu tem-
po.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

En 2003 mi kune kun István Ertl fon-
dis la retan bultenon Libera Folio,
kiun mi de tiam redaktas. La bulteno
strebas pli sobre kaj kritike ol la kuti-
maj asociaj bultenoj prilumi aktual-
ajn evoluojn en la Esperanto-mova-
do. Ĝi legeblas ĉe
www.liberafolio.org.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

Estimataj samideanoj!

Bedaŭrinde mi ne povis partopreni la
kongreson en Malmö. Dank' al kel-
kaj partoprenintoj, tamen La Espe-
ro povas publikigi iom pri ĝi.

Pli da informoj pri la kongreso kaj pri
la jarkunveno aperos en venonta
numero de *La Espero*. Agrablaĵn
legadon kaj someron!

Via redaktoro

130 kongresis en Malmö

Daŭrigo de la kovrilo

GRANDAN DANKON AL LKK EN MALMÖ

Jubileoj postulas ion ekstran, kaj ni ricevis kvar-tagan kongreson anstataŭ la kutima du-taga.

Kutime la SEF-estraro multe enmiskas sin en decidoj pri programeroj kaj ekonomia framo, sed ne multe ĉi-foje - preskaŭ neniel. Tio havis diversajn kaŭzojn. Unu kauzo estis Karin Lindquist. Tiu energia virino havas spertojn pri kongresoj kiel prezidanto de SEF 1985-91.

La aliaj LKK-anoj estas spertaj esperantistoj kaj scias kiel plani kaj labori.

Mi, kiu estis nomumita de la SEF-estraro por funkcii kiel kontaktpersono inter SEF kaj LKK, ne bezonis fari ion alian ol diri Bone! kiam Karin raportis. Estas facile por mi kiam sperta LKK faras la laboron.

La partoprenantoj trovis ke ĉio bone funkciis. LKK kaj multaj helpantoj devis multon fari por ke ni aliaj havu bonan tempon kaj sukcesan jubilean kongreson.

LKK laboris bone. Koran dankon!
Roland Lindblom

granda fiŝkaptista vilaĝo al moderna urbo kun industrioj sed ankaŭ nuntempe kiel centro por edukado. Jam en 1437 la urbo ricevis sian blazonon de Erik de Pommerujo kaj ĝi estas la plej malnova blazono en Eŭropo donita de reĝo.

Multaj enmigrintoj riĉigas la urbon. Homoj el 150 diversaj nacioj loĝas en Malmö, kaj tio ankaŭ kreas malfacilaĵojn rilate al senlaboreco.

Lena Jarnbring-Lindholm finis sian salutparoladon kun deziro ke la kongresanoj ankaŭ trovu tempon iomete rigardi la urbon. Ann-Louise Åkerlund interpretis.

Poste la urbo regalas per vino kaj frukto.

Bengt-Olof Åradsson, prezidanto de SEF, konstatis, ke kvakam multaj teknikaj ŝanĝiĝis, esperanto tamen transvivis. Nun ni festos, sed lunde ni komencos la laboron por la venontaj cent jaroj.

Roland Lindblom parolis pri eroj el la centjara historio de SEF, kies nomo de la komenco estis Sveda Esperantista Societo, kaj jam en 1906 estis pluraj kluboj en Svedio.

Dum la plej gloraj jaroj eĉ estis teatra grupo esperanta sub gvidado de Sandro Malmqvist. Unu svedo, nome Ernfrid Malmgren, estis prezidanto de UEA.

Altnivelaj kursoj estis aranĝitaj dum kelkaj someroj en Frostavallen, kaj multaj konataj esperantistoj faris prelegseriojn dum la jaroj ekz. Henrik Seppik, Lakshmiswar Sinha kaj Andreo Cseh.

Ileana Schröder, prezidanto de Dana Esperanto Asocio, gratulis al la jubileo kaj memorigis nin pri la multaj Dan-svedaj tagoj kiuj okazis 1938-1990. Poste estis 10-jara paŭzo, sed nun Sunda Esperanto Agado bone funkcias kiel kunlabora organo por la esperantokluboj ĉirkaŭ Sundo. Povi-



Ludas La perdita generacio.
Ĉiuj fotoj: Karin Lindquist.


las Jegorovas salutis en la nomo de Litova Esperanto Asocio kaj Bent Jensenius donis salutojn de Kopenhaga Kulturgrupo. Salutletero alvenis de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj de diversaj personoj.

La muzikgrupo La Perdita generacio tre ĉarme kantis kaj ludis, kaj poste sekvis la festparolado de Sean O'Rain el Irlando. Li parolis pri Lingva egalrajteco kaj diverseco en Eŭropo. Li multe parolis pri la hegemonio de la angla lingvo. Ne ĉiuj gelernantoj en Britujo devas lerni iun fremdan lingvon, kaj oni ne interesiĝas pri lingva interŝanĝo kun studentoj en aliaj landoj. La negativeco de la francoj kontraŭ esperanto malfermis la pordon por la angla lingvo en la eŭropa kunlaboro. Sean O'Rain portis emblemon sur sia jako kiu montris ke li parolas la irlandan lingvon por ke la homoj, kiu parolas tiun lingvon povu trovi unu la alian, ĉar nuntempe la angla lingvo tute "konkeris" ankaŭ Irlandon. Li konstatis, ke en ĉiuj aliaj landoj oni uzas grandajn monsumojn por subteni la anglan.

La inaŭguro de la jubileo finiĝis per la himno La Espero.

Diservo en Pauli preĝejo

Kvardeko da partoprenantoj vizitis la diservon en S:ta Pauli preĝejo. Anna kaj Mats Landfors gvidis ĝin, kune kun kelkaj aliaj membroj. Estis tre bela.



Agneta Emanuelsson, kiu esploris pri arkitekto Emil Langlet, rakontis ke la preĝejo S:t Pauli estas desegnita de la konata arkitekto Emil Langlet. Emil kaj Matilda Langlet havis kvar filojn, el kiuj tri estis aktivaj esperantistoj. La plej maljuna Filip estis la unua prezidanto en la Stokholma klubo kaj la plej juna Valdemar kune kun aliaj kreis klubon en Uppsala kaj estis la

unua prezidanto en la Stokholma klubo kaj ankaŭ ties unua prezidanto.

Jarkunsidoj

SEF havis sian jarkunsidon dimanĉe. Oni bezonas pli da tempo por pritrakti la diversajn punktojn, pro tio oni nur en venonta numero de La Espero publikigos la decidojn. Ankaŭ Dana Esperanto Asocio jarkunsidis samtempe.

Raportoj

La eĥo en la amaskomunikiloj estis kontentiga. TV4 havis 15 minutan eron en *God morgon* – bazitan sur intervjuo kun Sten Svenonius kaj Kim Henriksen. Intervjuo kun Janko Luin okazis en P4.

En Sydsvenskan kaj Skånskan estis artikoloj. En loka gazeto Spegeln Sten estis intervjuita. En Skånskan denove estis artikoleto Sten estis intervjuita en *Malmökanalen*. la 25-an de majo.

Dankoj

Sur la bildo la prezidanto de KEM dankas ĉiujn helpantojn dum la kongreso.



Cetere, dum la tuta kongreso Peter Bankholm preparis bongustan kaj abundan manĝaĵon kun asisto de lia edzino kaj la bofilo. Kelkaj klubmembroj bele aranĝis la tablojn kaj prizorgis cetere ĉion necesan.

Ne estis loko kaj tempo por aperiĝi ĉion pri la kongreso en tiu ĉi numero de La Espero. Do, ni revenos al la kongresa temo en n-ro 2006:4.

DEZIRAS
KORESPONDI

Lidia Bogusz, prezidantino de PEA/Filio en Szczecin volas interesanĝi bildkartojn, poŝtkartojn kaj spertojn.
lidabog@poczta.onet.pl

Gäster välkomna

Katrineholms Esperantoklubb hade tre gäster från Salo och två från Odder. Förutom det officiella programmet med seminarium, utflykt till Floda, konsert mm gjordes en mycket uppskattad utflykt till Rejmyre Glasbruk. Tack vare det gemensamma språket var det inte problem med förståelsen och även andra grupper fick lite hjälp med översättning.

Gästerna finns på fotot nedan.

Agneta Emanuelsson



Kaj alia raporto pri la sama vizito: Kadre de granda ĝemelurba renkontiĝo en Katrineholm 18-21 majo, kun entute pli ol 200 partoprenantoj, Agneta Emanuelsson kaj Roland Eriksson gastigis ses esperantistojn el Odder en Danio kaj Salo en Finnlando. Krom pluraj aktivecoj komunaj por la tuta aro da vizitantoj, la grupo de esperantistoj faris ekskurso al la vitrofarejo en Rejmyre.

Haldo Vedin

FOLKHÖGSKOLEKURS I ESPERANTO

Hällfors Folkhögskola förlägger sin första terminskurs i Esperanto till Esperanto-Gården i Lesjöfors. Kursen börjar 4 september 2006. Total studietid 15 veckor. Svenskar kan söka studiemedel från CSN. Prospekt med kursbeskrivning och priser samt anmälningsblankett kan beställas från Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors, telefon 0590-309 09 e-post: egarden@esperanto.se
Du kan även gå in på Hällfors folkhögskolas hemsida www.folkis.nu och hämta hem både prospekt och anmälningsblankett. Anmälan sändes till folkhögskolan direkt.

Hällfors Folkhögskola,
Lekstigen 2
712 33 HÄLLEFORS

Telefon +46 (0)591 - 643 90
Telefax +46 (0)591 - 106 16
E-post: fhs@hellefors.se

Föreläsningar

Vid svenska Esperanto-kongressen fanns det tillfälle att lyssna till många intressanta föreläsningar. Här är en sammanfattning av två av dessa.

Språkproblem i EU

Georgo Handzlik föreläste om språkproblem i EU. När den franska utrikesministern Robert Schuman 1949 föreslog en fransk-tysk union för stål- och kolhandeln var språksituationen lätt. Fransmännen förstod inte tyska och tvärtom.

Unionen planerade att anställa två grupper översättare, en fransk och en tysk. När unionen grundades två år senare var det redan sex länder och fyra språk. Det blev tolv översättningsvägar och fyra grupper. Nu talar man 20 officiella språk i EU-parlamentet, vilket ger 380 översättningsvägar med en grupp översättare för varje och kostar EU 30% av budgeten. Enligt EU:s lag är all officiella språk likvärda, situationen har blivit för kostsam och i praktiken spelar engelskan den viktigaste rollen på bekostnad av alla andra språk. En lösning vore ett enda språk för EU. Bästa möjliga enligt professor Green är ett som inte hotar något annat språk. Esperanto är logiskt att lära än andra språk, det är exaktare i sitt uttrycksätt än böcker.

Esperanto i Litauen


Povilas Jegorovas berättade att esperantister i Litauen har haft mycket problem med den mäktiga ryska staten.

Överhuvudtaget betraktades grupper och föreningar med misstänksamhet. Samtidigt ville Sovjet visa hela världen vilket öppet samhällsklimat man hade. Via TEJO inbjöds utländska esperantister till en festival i Moskva. Sovjetiska vetenskapsakademien fick i uppdrag att ta reda på vad esperanto var. I Pravda skrevs en artikel om att esperanto var något bra och när Pravda var positiv, så blev det lättare att öppet bilda klubbar och ge ut skrifter. Lättare, men inte lätt. Man kunde i alla fall delta i Balta Esperanta Tendaro.

På 10 år kom bara 10 nr av den Litova Stelo ut. Det var en skriande brist på läroböcker.

Förhållandet till kommunistpartiet växlade. Esperantister - mot staten - kunde "försvinna" i Sibirien. Men kommunistpartiet kunde också uppmuntra utländska kontakter för att
Fortsättning på sidan 5.

Klas Persson



Klas var en entusiastisk medlem som hade många synpunkter och som ofta ställde upp, när klubben behövde hans kvalifikationer.

År 1979 blev Klas medlem. Han deltog aktivt i klubbarbetet och var från 1984 till 1993 klubbens ordförande. Efter examen i språket deltog han i en resa till vår vänort Kassel 1981 för att träffa meningsfränder.

Klas medverkade ofta i klubbens radioprogram, Radio Esperanto. Han hade en god radoröst.

Klas medverkade i en presentation av språket under det Europeiska Språkåret 2002 och förberedde Svenska Esperantoförbundets årsmöte 2002.

Vi pratade så mycket som möjligt på esperanto, även när vi talade i telefon. Senare blev det mer e-brev på esperanto, även under hans sjukdom. Klas hade inga planer på att lämna jorden.

Strax före sin död, när jag pratade med Klas i telefon, hade han hoppet kvar att sjukdomen skulle ta en positiv vändning.

Wim Posthuma (ordf.)

Malte Markheden

Nokto super Össjöa lago,
dikaj nuboj kolektigas.
Vi ne plu estas en la amata loko,
ni homoj eterne ne vivas.

Vi loĝis en domo memkonstruita.
Vi mem estis la arkitekto.
Obstine de leĝo kreita,
estiĝis la domokolekto.

La kluban gazeton
vi verkis kaj presis.
Milfojan kapablون
vi vere posedis.

Nun trankvile dormu
post verko bone farita.
Eterne la memoro vivu
pri homo talente dotita.

Hubert Lindros

Intervjuo kun M.M. aperis en La Espero 2006:1. ndlr.

Dolchamar gajnis kun finnaj monstroj

Unuafoje en la kvindekjara historio de la tuteŭropa kantkonkurso de Eurovision gajnis finna bando. Unu el la membroj de la maskita bando Lordi estas jam pli frue konata al la esperanta publiko, ĉar ŝi ludis ankaŭ en la plej fama esperantlingva bando de Finnlando, Dolchamar. La dur-roka bando Lordi, kies membroj ne volas malkaŝi sian nomon kaj koncertas en monstraj maskoj, estis en marto iom surprize elektita la reprezentanto de Finnlando en la tuteŭropa kantkonkurso de Eurovision. Pro tio la bando subite ricevis grandan atenton de la amaskomunikiloj, kaj baldaŭ la populara bulvarda gazeto *Iltaalehti* publikigis la informon, ke en la bando ludas interalie Leena Peisa. Ŝi partoprenis ankaŭ en la dua albumo de Dolchamar, *Rebela Sono*, ludante klavarojn kaj kantante en la fono.

www.liberafolio.org

ĈEL 55-jara

Vespere de la 16-a de majo la Ĉina Esperanto-Ligo havis bankedon en Pekino por festi sian 55-jaran jubileon. Ĝin ĉeestis ĉ. 100 personoj, inkluzive de samideanoj el Rumanio, Hispanio, Bulgario, Ĉeĥio, Germanio kaj Finnlando.

Aktivaj muzikistoj

Se 2005 estis jaro dediĉita al la pripensado kaj preparado de novaj projektoj, tio ja ne estis vana, kaj la unuaj efikoj estas ekde nun aŭdeblaj kaj videblaj, kaj nur estas la eko de bela listo!

La distribuado tuja de la nova albumo de jOmO, 'jOmO Slavumas', estas tutcerte la granda evento de ĉi-printempa komenciĝo. Tiu verko, jam disponebla ĉe Vinilkosmo.com, estas gratifikita per videoprezento spektinda ekde nun enrete.

La reveno de Kore, kiu surprizos ĉiujn post malapero kiu ŝajnis anonci la finon de la neforgesebla bando de Kris Spitzer, preparas ne nur duan albumon, sed ankaŭ rekoncertos en Esperantio en la kongreso de UFE en

Rennes en majo kaj en FESTO.

Du novaj volumoj prezentante la rusan bardon, Miĥail Povorin, venos por pliampleksigi tre baldaŭ la rusan kolekton "Oraj kantoj", kaj ankaŭ du kompilaĵoj, unu dediĉita al hiphopo kaj alia al metala muziko, estas en la bakujo de [Vinilkosmo](http://Vinilkosmo.com).

Kaj legante asidue, vi malkovros la antaŭeniron de la albumo de Supernova, novaĵojn el Afriko, de la insuloj, de EUROKKA, ktp., ktp.

www.vinilkosmo.com

KALENDARO

14-18 junio **Planado de Nitobe-centro por lingva demokratio** - www.nitobe.info kaj seminario. Gottenburgo. Organizas: Hokan Lundberg.

23 junio. **Sanktjohana/Mezsomera festado en la vilaĝo**. EsperantoDomo, Lesjöfors. Gastoj bonvenaj. Venos norvegaj esperantistoj.

26 junio-30. junio. **Internaciaj Someraj Kursoj de Esperanto** en Lesjöfors. Inf: Esperanto-domo, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. 0590-30909, egarden@esperanto.se (Sampempe seminario por spertaj esperantistoj.)
1-8 julio. **Ekoturisma Seminario** (EKOTUR 2006), Dobrichovice (apud Prago), Ĉeĥio. www.kava-pech.cz/ekotur. KAVA-PECH, Anglická 878, CZ 252 29 Dobrichovice. www.kava-pech.cz. EKOTUR 2006 estos tiamaniere organizata, ke la belecon de la regiono ĉe la rivero Berounka povos ĝui kaj biciklantaj kaj piedirantaj ekoturistoj.

Tutaj julio kaj aŭgusto. Diversnivelaĵoj kursoj. Kastelo Grezijono, okcidenta de Parizo.

<http://gresillon.org/accueil.htm>

3-7. julio **Esperanto-kursoj** (elementaj kaj progresantaj) Heinävesi, eafsekretario@esperanto.fi

4-8. julio **42-a Baltlandaj Esperanto Tagoj** en Kuressaare, Estonio. +372-6035272; esperant@hot.ee

22-27 julio. **4-a Balta Esperanto-Forumo**. La ĉefa temo estas Zamenhof kaj la nuntempo. www.esperanto.org/Ondo/Bef/Bef4.htm. Kontaktadreso: 1. Elżbieta Karczewska: ul. Waszyngtona 14 B m 119, PL 15-269 Białystok, Pollando (pri aliĝado kaj lokaj aferoj) 2. La Ondo de Esperanto: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando (pri la programo).

på så sätt sprida kommunismen.

1988 blev Litauen självständigt. Utan kostnad hade man fått en klubblokal i Kaunas -Klara Silberniks hus. Staten betalade.

En grupp bildades för att utbilda lärare. Det blev inte så mycket undervisning i skolor - däremot i studiecirkel. Man gjorde ett grandios program för att ge ut böcker. Det var viktigt att det inte var klubbarna utan ett vanligt förlag som gav ut böcker, för att ge status åt utgivningen.

Före 2000 fanns inga läroböcker på litauiska. Nu finns 10! Kulturministeriet finansierar vissa böcker. Under de senaste fem åren har 70 böcker (förutom läroböckerna) givits ut.

Siv Burell och Anita Dagmarsdotter

sezonojgazinter.net

25-29 julio **39-a ILEI konferenco** en Parma, Italio.

29 julio-5. aŭgusto **91-a Universala Kongreso de Esperanto**, en Firenze. fei@esperanto.it.

www.ukflorenco2006.it

29 julio-5 aŭgusto **37-a Internacia Infana Kongreseto**, IIK 2006 en Prato, Italio. bert.schumann@free.fr

6-13 aŭgusto **62-a Internacia Junulara Kongreso** en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. hara@ikso.net

6-12 aŭgusto. **1-a Internacia somera renkontiĝo**: Inter karsto kaj maro. Turisma aranĝo por sportemaj esperantistoj el la tuta mondo. ESPERANTO TRIESTE, C.P.601, 34100 TRIESTE CENTRO - ITALIO. Retadreso: noredv@tele2.it aŭ

testudo@adriacom.it

13-20 aŭgusto. **IJS en Makó, Hungario**. Celgrupo: junuloj kaj ĉiuj kiuj sentas sin junaj. <http://www.ijs.hu>

20-28 aŭgusto. **MELA. MEMzorga LAĝ-umado**, 35 km sude de Budapest, en piedira distanco de la stacidomo Délegyháza. Kontaktadreso: Andi Münchow, Oberstr. 15, D-30167 Hannover, Germanio. tel. +49-(0)511-700011

4 septembro-? decembro. **15 semajna Esperanto-kurso**. EsperantoDomo, Lesjöfors. Aranĝas: Hällfors Popola Altlernejo. Vidu paĝo 4.

12-16 septembro. **7-a Baltmara turisma renkontiĝo**. Negast ĉe Stralsund, Germanio. Kontaktadreso: Gunter Ebert, StraÙe am Sund 1, 18445 Kramerhof, Tel.: +49 3831 490003. Retadreso: Gun.Ebt-online.de

7-8 oktobro **Seminario de Sveda Esperanto-Instituto**. Vidu paĝo 7.

www.eventoj.hu kaj aliaj

Poemo de Trym

1 Koleris kaptis Sving-Toron je trovo,
ke mankis Martelo post dormo dura,
barbon li skuis kaj bukajn harojn,
serĉe pripalpis plankon Ter-Filo.

2 Kaj jene parolis Toro tujvorte:
„Aŭdu min, *Loki*, kion mi diras,
min trafis faro sen precedenco:
estas al Aso Martelo ŝtelita.“



„Tli tiam Toron vestis nuptorobe...“

3 Alpaŝis ili en korton de *Freyja*,
kaj jene parolis Toro tujvorte:
„Ĉu vi alpruntus plumveston flugilan
por ke mi trovu Martelon ŝtelitan?“

Freyja diris:

4 „Al vi mi ĝin pruntus eĉ se el oro,
volonte donus eĉ se el arĝento.“

5 Ekflugis *Loki*, - zumegis tra plumoj, -
ĝis li forlasis la lokojn de Asoj
kaj jam eniris la mondon de Jotunoj.“

6 „Sidis sur altaĵo *Trym* Jotuno-reĝo,
plektis orŝnurojn por siaj hundoj,
tondis kolharojn al siaj ĉevaloj.“

Trym diris:

7 „Kio pri Asoj? Kio pri la Elfoj?
Kial vi alvenis sola Jotun-mondon?“

Loki diris:

„Misiras ĉe Asoj, misiras ĉe la Elfoj:
Ĉu vi ŝtelkaŝis la Martelon de Toro?“

Trym diris:

8 „Mi la Martelon de Toro ŝtelkaŝis
ok verstojn profunde en firma tero.
Neniu ĝin trovos nek reakiros,
se mi ne havos *Freyja* por edzino.

9 Ekflugis *Loki*, - zumegis tra plumoj, -
ĝis li forlasis la mondon de jotunoj,
kaj jam eniris la lokojn de Asoj.
Toron li renkontis en kortomezo,
kiu lin alvortis tuj jenparole:

10 „Ĉu rezulto egalas vian flugpenadon?
Diru en aero vian novaĵon.
Ofte al sidanto rakontoj misiras
kaj same al kuŝanto mensogoj sin trudas.“

Loki diris:

11. „Rezulto egalas al flugpenado;
Trym havas la Martelon, Jotuno-reĝo.
Neniu ĝin trovos nek reakiros,
se li ne havos *Freyja* por edzino.“

12 Alpaŝis ili en korton de *Freyja*,
kaj jene parolis Toro tujvorte:
„Surmetu vi, *Freyja*, robon nuptofestan,
veturu ni du al Jotun-mondo.“

13 Koleris tiam *Freyja* kaj nazoblovis,
tremis tratute tereno de Asoj,
rompiĝis la granda kolĉeno de *Brisingoj*:
„Min vi ja trovos la plej alvirema,
se mi kunveturos al Jotun-mondo.“

14 Baldaŭ la Asoj sidis kunvene
kaj ĉiuj Asinoj venis kunside,
pri tio diskutis dioj potencaj,
kiel akiri ree Martelon.

15 Diris tiam *Heimdal*, plej blanka el Asoj,
antaŭvidema kiel Vanoj ĉiuj:
„Vestu ni Toron per nupta robo,
portu li la grandan kolĉenon *Brisingan*.“

16 Sur lian zonon ni pendigu ŝlosilojn
per virinaj vestoj ni kovru genuojn,
sur bruston ni metu larĝajn ŝtonojn,
kaj sur la kapon vestpinton ornaman.“

17 Tiam diris Toro, plej forta el Asoj:
„Min Asoj nomus fie virineca,
se mi nuptorobon akceptus porti.“

- 18 Diris tiam Loki, filo de Laufey:
„Silentu, Toro, kaj tenu vian buŝon.
Okupos tuj jotunoj la diajn lokojn,
se vi ne Martelon ree akiros.“
- 19 Ili tiam Toron vestis nuptorobe,
surmetis la grandan kolĉenon Brisingan,
ŝlosilojn pendigis sur lian zonan,
kovris genuojn per vesto virina,
kaj larĝajn ŝtonojn metis sur bruston,
vestpinton ornaman sur kapon lian.
- 20 Diris tiam Loki, filo de Laufey,
„Mi vin akompanu kiel servistino,
ni du veturu kune al Jotun-mondo.“
- 21 Tuj estis kaproj pelitaj hejmen,
al tiriloj ligitaj, rapide ili kuru.
Fendiĝis rokoj, brulegis tero,
veturis Toro al Jotuno-mondo.
- 22 Diris tiam Trym, Jotuno-reĝo:
„Ekstaru, jotunoj kaj benkojn pajlu.
Alvenas Freyja, por edziniĝo,
filino de *Njord* el *Noatun*.“
- 23 Paŝas sur kampo orkornaj bovinoj,
nigraj virbovoj, plezuro jotuna,
objektojn valorajn mi havas en abundo,
sole mi sentas ke mankas Freyja.“
- 24 En vespero frue ili jam alvenis,
metita estis medo sur tablojn jotunajn.
Unu manĝis bovon, kaj ok salmojn,
ĉiujn bongustaĵojn taŭgajn por virinoj,
trinkis edzo de *Sif* tri kuvojn da biero.
- 25 Diris tiam Trym, Jotuno-reĝo:
„Kiu vidis virinon pli akre mordi?
Ne vidis mi virinon pli larĝe mordi
kaj tiom eltrinki da medo forta.“
- 26 Pretis respondi servistino saĝa,
kiu vortojn trovis por respondi al jotuno:
„Neniom Freyja manĝis dum ok noktoj,
tiom ĝi fervoris pri la nupta festo“
- 27 Levis li vualon, deziris kisi,
sed ektime saltis laŭlonge de la halo.
„Kial estas akraj okuloj de Freyja?
ŝajnas ke tie brulas fajro plej ardega.“
- 28 Pretis respondi la servistino saĝa,
kiu vortojn trovis por respondi al jotuno:
„Neniom Freyja dormis dum ok noktoj,
tiom ĝi fervoris pri la nupta festo.“
- 29 Envenis la aĝa fratino jotuna,
kiu kuraĝis nuptomonon peti:
„Demetu viajn ringojn ruĝe orajn,
se vi volas havi mian amon,
mian amon kaj korfavoron.“

30 Diris tiam Trym, Jotuno-reĝo:
„Martelon enportu por konfirmi la nupton,
metu *Mjollnir* sur ŝiajn genuojn,
sanktigu nian nupton laŭmane de *Var*.“

31 Ŝvelis ĝojo en brusto de Toro,
kiam li la Forta rekonis Martelon,
Unuan mortfrapon li al Trym faris.
kaj tutan lian genton li morte disbatis.

32 Mortfrapis li la oldan fratinojn jotunan,
kiu nuptomonon kuraĝis peti,
Ŝi batojn ricevis anstataŭ mono,
kaj frapojn de Martelo anstataŭ ringoj.
Tiel Odin-filo Martelon reakiris.

Tradukis: **Baldur Ragnarsson**

La Espero havas la honoron publikigi la Poemon de Trym, kiu estas bone konata parto de la Poezia aŭ Malnova Eddo/Edao. En ĝi mezepokaj islandanoj surpaperigis pranordiajn poemojn. Dank' al ili ni pli multe scias pri la pranordiaj kulturo kaj religio. Oni tamen memoru ke la poemoj estis surpaperigitaj nur post la venko de la kristanismo. Ekzemple en tiu ĉi poemo oni ŝercas pri la dioj.

Baldur Ragnarsson jam en la 1960-aj jaroj publikigis parton de la Eddo en la libro "Islandaj pravoĉoj". Nur preskaŭ la tuto estas prespreta. Komentojn oni povas sendi al Baldur Ragnarsson, esp@mh.is

La redaktoro

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

invitas al du-taga seminario en Karlskoga Popola Altlernejo la 7-an ĝis la 8-a de oktobro 2006. (Eblas alveni jam vendrede.)
Temo: Informado, instruado kaj utiligado de esperanto

Programo:

Vendrede 19.00 Interkona vespero, Lars Forsman mallonge rakontas pri la lernejo. Kim Henriksen ludas, kafo/teo kaj buterpano

Sabate 9 – 10 Kafo/teo en la manĝejo. 10-11.30 Radojica Petroviĉ: Aktualaj tendencoj en pedagogio, instru- kaj lerneteknologio kaj instrumentodiko de lingvoj. 12 – 13 Lunĉo 13-14.30 SEI jarkunveno, kvizopromenado 14.30-15 Kafo/teo 15-16.30 Håkan Lundberg: Informoj pri Nitobe – lingva diverseco kaj demokratio. Politikaj aspektoj de lingvo kaj komunikado. 17 – 18 Vespermanĝo 19.00 - Distraĵoj en la kafejo kun inter alie Kim Henriksen.

Dimanĉe 8 – 9 Matenmanĝo. 9-10.30 Radojica Petroviĉ: Sukcesfaktoroj en esperanto-instruado. Modernigo de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA. 10.30-11 Paŭzo. 11-12.30 Sonja Petroviĉ-Lundberg: la esperantista junulara unuiĝo kaj ĝia laboro por esperanto. Nova versio de lernu.net. 12.30-13.30 Lunĉo.

Kotizoj: en unu-lita ĉambro SEK 1 700; en dula ĉambro SEK 1 600.

La prezo inkluzivas konferenckotizon, unu tranoktadon kaj manĝadon laŭ la programo. La ĉambroj havas proprajn necesejon kaj duŝejon.

Por aldone SEK 150 vi povos alveni jam vendrede. Tiu prezo inkluzivas tranoktadon kaj vesperan sanviĉon.

Aliĝo: pagu al plusĝirkonto 5 15 11-4 plej laste la 29-an de septembro.

Ne por infanoj

Herman Nyeck Liport & Chamberline Gnuefack Zedong. Historioj... Rakontu! Instruaj Rakontoj el Afriko. AfrikNatura-Esperanto Eldonejo. Douala, Kamerunio 2006. 125 p.

Afriko estas konata pro siaj fabeloj kaj rakontoj. Ili okupas gravan lokon en diversaj afrikaj literaturoj. Pro tio estas nature ke multaj afrikaj libroj en Esperanto estas fabelaroj. Tiu ĉi libro prezentas 15 rakontojn "por infanoj" kaj supleme kolekton de proverboj el Afriko.

La fabeloj estas prezentitaj kun mallongaj enkonduko kaj kun "sciendaĵo" post la rakonto mem. Per ĝi la leganto lernas la celon de la rakonto.

La fabeloj estas vere legendaj. Oni havas la im-

preson ke temas pri veraj Afrikaj fabeloj, kiujn oni rakontis, por instrui al aliaj homoj gravajn spertojn pri la vivo. Titoloj kiel "La leporo kaj la hieno ĉe la putro" kaj "La leciono de pantero al malrespondeca vaganto" eble donas percepton pri la etoso de la fabeloj.

La lingvaĵo estas ĝenerale bona. Kelkaj esprimoj estas por ni eŭropanoj nekutimaj, kvankam ili estas en korekta Esperanto. Ni devas kutimiĝi al tio ke la kreskanta nombro de esperantistoj en Afriko influas nian lingvon.

Eble la fabeloj dekomence estis "por infanoj", kiel estas skribite sur la kovrilo. La Esperanta eldono tamen ne estas konvena legaĵo por infanoj. Unue, la lingvaĵo estas tro komplika kun tre longaj frazoj, ofta manko en Esperantaj porinfanaj libroj. Due, la libro estas presita per skribaj litertipoj, kiuj malfaciligas la legadon de la libro. Vera manko en la libro estas la malbelaj ilustraĵoj, kiuj verŝajne estas prenita el iu komputila kolekto de ilustraĵoj. Pli bona ideo estus peti al kamerunia artisto fari afrikstilajn desegnaĵojn. Malbelaj ilustraĵoj en bonkvalite presita libro ne ĝojigas la leganton.

Pro la bonaj rakontoj la libro tamen estas leginda kaj aĉetinda.


Leif Nordenstorm

Lernolibroj por infanoj

Jana Melichárková. Esperanto pro deti. KAVA-PECH. Dobrichovice, Ĉeĥio. 2003. 73 p; Jana Melichárková. Esperanto por infanoj 2. Esperanto pro deti 2. KAVA-PECH. Dobrichovice, Ĉeĥio. 2006. 101 p.

La unuan volumon de "Esperanto por infanoj" mi jam dum du jaroj uzis instruante la lingvon al miaj plej junaj gefiloj. La tradukoj de la vortoj estas en la ĉeĥa, kaj la klarigo pri gramatikaĵoj ne estas sufiĉa por memstudado. Tial la libro ne sufiĉas por memstudado, sed ĝi tamen estas bona lernolibro se plenkreskulo instruas al unuopa infano aŭ al tuta grupo.



La unua volumeno estas komentanta kurso. Ĝi enhavas simplajn frazojn kaj ekzercojn pri gramatikaĵoj kaj vortoj. La studado fariĝas ludo kun helpo de la libro.



En 2006 aperis la dua volumeno de la verko. Ĝi daŭrigas en la sama maniero kiel la unua volumeno. En ĝi kompreneble estas iom pli da veraj rakontoj.

La ilustraĵoj de Miroslava Tomečková estas tute bonaj. Mi rekomendas la librojn al ĉiuj, kiuj instruas la internacian lingvon al infanoj, kaj cetere ankaŭ al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne faris tion, sed kiuj volas komenci.

Leif Nordenstorm




POR LEGEMULOJ

Vidu: www.poulthorsen.dk
Nova retpaĝo pri la pasinta dana verkisto.


Novaĵoj!

La frakseno Igrdrasilo
ANTIKVA DIA HISTORIO



Alf Henrikson & Edward Lindahl

La Frakseno Igrdrasilo. 200 SEK.



Mio, mia filo. 125 SEK.

Mendu ĉe www.algonet.se/~eldona aŭ per la adreso sur paĝo 2.

Eldona Societo Esperanto

